

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 04/02/2021 Kvincentdeksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)



Entute **809,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **293,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **241,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **218,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **57,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde majo 2021)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 20 DE “THE ESPERANTO-TEACHER” (de Mason Stuttard).

### N.ro 21 de “Por Komencantoj”.



En ĉiuj lingvoj precizeco estas grava bezono, precipe por eviti miskomprenojn. Sed precizeco de esprimado estas eĉ pli necesa en Esperanto, ĉar ĝi tre ofte uzatas inter homoj kiuj parolas malsamajn lingvojn. Tial estas rekomendinda ne uzi eblajn pluformadojn de Korelativoj, kiaj “(la) tielo” (= la maniero) kaj “(la) tieo” (= la loko). Oni renkontas tamen la adjektivojn “tiea” kaj “tiama” kaj la adverbojn “iomete” kaj “tiumaniere” k.a. kaj la evitindan “ĉiesulino” por prostituino.

Precizeco de lingvo dependas multe de via lingvostilo: ju pli simpla ĝi estas des pli preciza kaj tuj komprenebla. Kvankam en Esperanto oni rajtas ŝanĝi la sisekvon de la frazpartoj multe pli ol en etnaj lingvoj, tia mikspoto de pozicioj faras la lingvon malpli klara. Uzu ankaŭ simplajn verbojn, kaj evitu kompleksajn frazojn. La aŭskultantoj benos vin.

Marcel Leereveld.



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

## Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## Nia bela mondo.

**NIA MALBELA MONDO .**



De tempo al tempo aperas nova artikolo, aŭ eĉ libreto, pri kiel plibonigi nian socian kaj ekonomian sistemojn. Estas precipe dum periodoj kia la nuna koronviroza, kaj post militoj, ke oni sentas la bezonon por ŝanĝo. Ekzemple post la dua mondmilito oni starigis kelkajn marksisme (NE leninisme) komunistajn reĝimojn, ekzemple en la antaŭe portugala kolonio de Mozambiko. Eksteraj fortoj detruis tiujn, kvankam Norvegujo sukcesis reteni specon de socialisma kapitalismo. La kaŭzo de la malsukcesoj estas, ke ekzistas potencaj partoj en niaj nunaj ekonomiaj sistemoj. Detru tiujn potenculojn ne facilas sen sangaj revolucioj ne konsilindaj. Do ne temas pri simpla enkonduko, per registaro, de plibonigoj aŭ de grandaj ŝanĝoj, ĉar unue oni devos venki la potencajn kontraŭulojn de la ŝanĝoj, kiuj inkluzivas la registaranojn.

La nuna situacio de la mondaj socisistemo kaj de la monda ekonomiosistemo estas tia, ke dum la lastaj almenaŭ cent jaroj kredis en la t.n. okcidentaj nacioj tre potencaj internaciaj kompanioj kiuj kune kun potencaj bankoj kaj militistaj fortoj, precipe en Usono, kune decidas kiel en la mondo konduki ne nur la ekonomio sed ankaŭ la ŝtataj socioj. La homoj ne rimarkas tion, ĉar la kompanioj agas pli-malpli sekrete, aŭ nepublike, kaj same agas la obeantaj ŝtataj registaroj, sub subpremo. La potenco de tiaj kompanioj estas tiom fortega, ke neniu homo, neniu homgrupo, kaj neniu ŝtatregistaro kapablas kontraŭi ĝin. Tiu potenco etendiĝas super ĉiujn kontinentojn escepte de gravaj partoj de Azio. Nur la nekapitalisma parto de Azio povos fortiĝi tiom ke ĝi eble povos detru aŭ flanken puŝi la nunan kapitalisman hegemonion.

Ĉu tia ŝanĝiĝo de mondpotenco valoros? Por iuj homoj jes kaj por aliaj homoj ne. Kaj do ekestos homgrupoj kiuj deziras la ŝanĝiĝon kaj aliaj kiuj deziras la nunan situacion. Meza vojo ekzistos nur, se ambaŭ kampoj restos sampotencaj, kio eblas. Sed por ekhavi tian situacion, la nekapitalisma parto devos elde nun multe pli kreski. Tial multaj homoj subtenas, ideologie aŭ praktike, la nunan plifortiĝon de la militisma potenco de Ĉinujo.

Se tia plifortiĝo de Ĉinujo estos tiom ke ĝi detruas la kapitalisman mondon, por la homoj ne multe ŝanĝiĝos: oni ŝanĝos de unu kapitalisma diktaturo al ĉina diktaturo. La nura pliboniĝo por la homaro okazos, se ambaŭ pli-malpli sampotenciĝos. Ni, la ordinaraj homoj, povos agi pri tio nur iomete, ĉar ambaŭ potencoj estas diktatoraj, sed nacioj kiuj ankoraŭ ne plene apartenas al unu el la du kampoj kapablos grave influi la estontan historion. Aŭstralio kaj eŭropaj nacioj estas en tiu klaso de potencformado. Nuntempe Aŭstralio ankoraŭ estas komplete je la flanko de la internacia kapitalismo, sed povos fariĝi neŭtrala influorto. Tio

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

dependos de la aŭstralianoj, kaj kunokazigos rezisti la diktaturon de la kapitalismaj kompaniejoj.

Antaŭ kelkaj tagoj la njuzelanda registaro subskribis la en la mondo plej vastan Liberkomercoakordon (Free Trade Agreement). Ĝi bezonas nur akceptati de la parlamento, kio certe okazos. Ĝi estas kun Ĉinujo, kaj forigis aŭ tre malmultigis la enirimpotojn kaj rezultos en granda kvanto da komerco por Njuzelando. Ĝi tre utilas ankaŭ, ĉar en ĝi estas klaŭzoj por savi la ekologion de la lando. Tiu akordo estas la komenco de la sendependa marĉandado ate de neŭtralaj landoj por egalfortigi la du ekonomiajn blokojn, la liberkapitalisman de la Okcidenta mondo kaj la ŝtatkapitalisman de Ĉinujo. Post tio ĝi eble devos subteni malfortiĝintan Usonon.

Plue: En ĵusa kunveno de *World Economic Forum* (Monda Ekonomia Forumo) la rusa prezidisto Putin opiniis, ke tutmonda milito povos eksplodi pro kreskanta radikalismo kaj pro ekonomia malegaleco. Li esperas ke tia milito ne okazos, ĉar ĝi “estos la fino de nia civilizacio”. Kaj laŭ li ni devas fari kion ni povas por eviti ĝin. Evidente en tia milito Rusujo penos esti sendependa. Kaj ankaŭ mi opinias, ke ni evitu la militon. Ni povos tion fari nur se Aŭstralio kaj multaj aliaj nacioj restos neŭtralaj, kaj minacos ke ni helpos tiun en la du, Usono kaj Ĉinujo, kiu ne komencos la militon. Tiel ni povos balanci la du potencojn kaj igi ilin decidi ne komenci la teruran militon. Sed por tio ni, Aŭstralio kaj la resto de la mondo, devos esti komplete sendependaj kaj neŭtralaj. Tio estas ebla, kiel montras la relative malgranda Njuzelando, kaj kelkaj aliaj landoj jam. Do per balancigo ni eble evitos militon. Verŝajne ne ekzistas alia maniero.

**Marcel Leereveld.**

## LA BELA NJUZELANDO .

Vi rimarkis mian uzon de “Njuzelando” por tiu ŝtato. Mi faras tion, ĉar *New-Zealand* ne estas Novzelando, ĉar nova Zelando estas la nova nederlanda provinco Zelando kiu en la jaro 1953 rekreatis per digoj kaj dunoj, post malaperi sub la Nordmaro en la grandaj inundoj dronigantaj du mil homojn kaj dekojn da miloj da brutoj. Tiu plifortigita nova Zelando eble refoje dronos, ĉifoje pro la plialtiĝo de la marnivelo pro la klimatsanĝiĝo.

Do la nura eblo estas uzi Njuzelando, tuj kompreneblan.

**Marcel.**

## ĈU IU SCIAS ?

Ĉu ankoraŭ vivas persono, kiu lernis Esperanton antaŭ mi, en 1934, kaj do parolis la lingvon dum pli ol okdek-ses jaroj?

Ĉu ankoraŭ ekzistas homo kiu, kiel mi, ĉeestis la S.A.T.-kongreson en Parizo en 1935 kiun partoprenis ankaŭ Lanti, la fondinto de S.A.T. ?

Ĉu ekzistas ankoraŭ persono kiu konis Lydia, unu el la filinoj de Zamenhof, kiun filinon mi renkontis en la jaro 1936 en la franca urbego Liono, kie ŝi loĝis ĉe la esperantista direktoro de la liona radiostacio, D.ro Borel?

**Marcel.**

## STRANGA !

La eŭropaj arboj en mia ĝardeno, (tilio, kverko, fago, k.t.p.) kreskas preskaŭ duoble pli alten ol en Eŭropo. Mi demandas min, ĉu tio okazas pro la klimatsanĝiĝo. Antaŭ kvindek jaroj

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

mi ne rimarkis tiun altan kreskadon. Ankaŭ kelkaj el la aziaj arboj estas pli altaj ol en Azio. Tio faras pli da ombro nedezirata. De unu afrika, Gleditŝia, mi jam forsegis la duonon pro tio. Dum la ĵusaj jaroj ni havis en Melburno tre multe da pluvo. **Marcel Leereveld.**

## La homa krueleco

Kara Katja,

en AE 515 aperas laŭ via atentigo la UEA mesaĝo okaze de la tago de la holokaŭsta memoro. Ne povas esti ia ajn dubo, ke ni neniam rajtas forgesi pri la suferoj, kiujn la naziistoj kaŭzis al la homaro.

Sed ju pli longe mi vivas, ju pli mi ekscias pri la historio, des pli mi venas al la kompreno, ke la homa krueleco, kiun la naziistoj elmontris, bedaŭrinde ne estis unika. Okazis genocidoj kaj antaŭ la Tria Regno kaj post ĝi. Tiom longe, kiom iuj subtenas la percepton, ke la naziistoj estis unikaj en sia krueleco, tiom longe vivteniĝas la falsa hompercepto, ke aliaj ne povus elmontri la saman kruelecon.

Ĉu ne estas la tempo por aldoni memortagon kontraŭ homa krueleco?

Amike, **Peter Weide**



Karaj gelegantoj, kara redaktoro

en Svislando, mi aŭdis pri Aŭstralio en novaĵelsendo ĉe ŝtata radio, ke pri festotago pasintsemajna vialanda, ne ĉiuj ĝojas same intense. Mi ŝatus legi pli, se iu pretas ekvilibre prezenti pri ĝojo kaj pri malĝojo. **Ueli Haenni** en Bern.

Ne estas ofta, ke mi aŭdas pri Aŭstralio en nuna neĝo ĉe mi.

Mi scias, ke ĉe vi someras. **Ueli**


## Vortaroj

Recenzo: *The Dictionary of Lost Words* (La Vortaro de Perditaj Vortoj) de Pip Williams, Affirm Press 2020, ISBN 9781925972397.

Komence en la 1880-aj jaroj, multaj homoj laboris por krei la *Oxford English Dictionary*. Ili sendis samgrandajn paper-slipojn kun citaĵoj por montri kiel vorto estis uzata, al komitato en Oxford. Komitatanoj diskutis, kiujn vortojn enmeti. La unua volumo, *A ĝis Ant*, estis publikigita en 1884. Volumo 12, *V ĝis Z*, aperis en 1928. En tiu jaro okazis fest-vespermanĝo por 150 viroj, kiuj laboris por la Vortaro. La virinoj, kiuj ankaŭ laboregis por la Vortaro, ne estis invititaj, sed oni permesis al tri spekti el balkono dum la viroj manĝis. Tiuj jaroj estis la epoko de la lukto por voĉdonrajtoj de virinoj en Britio.

(Ino) Pip Williams sin demandis, - Kio pri vortoj uzataj de virinoj, aŭ de vendistoj en bazaroj, sed ne skribitaj? Kial neologismo uzata nur unufoje, de verkisto Charles Dickens, rajtis eniri? Kial vortoj, kiuj havis longan historion sed iĝis fiaj, mankas al la Vortaro?

El tiuj elementoj Pip Williams kreis romanon pri fikcia senpatrina filino de vortaristo. Kiel knabineto, Esmé kutime sidis kaj ludis sub labortablo en *Scrippy*. Iun tagon ŝi kaptis falitan slipon, pri *bondmaid* (sklavino, deviga



Pip Williams

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

laborantino). Poste ŝi komencis kolekti duplikatajn slipojn, kaj kiel juna virino faris proprajn slipojn pri parolataj, ne skribitaj, vortoj.

Servistino diras, - Kial? Duono de la homoj, kiuj diras tiujn vortojn, neniam povos legi ilin. Esmo respondas, - Sed iliaj vortoj gravas.

El tiuj slipoj ŝia edzo, printisto, faris por ŝi *Women's Words and their Meanings* (Vortoj de Virinoj, kaj iliaj Signifoj). Multaj fortaj virinoj aperas en la rakonto.

La romano instigis min pripensi vortojn. Mi speciale memoros el la rakonto amon por fordonenda bebo, kaj la teruro kiam telegram-portisto frapas ĉe pordo dum milito. Ja leginda. Kial recenzi tiun romanon ĉi tie? Ĉar Vortar-komitato instruas esperantajn frazojn al la knabineto Esmo (jam en 1887!), kaj poste, ŝi uzas e-vortojn por provi komuniki kun bombard-ŝokitaj soldatoj. Amico (tiel), sekura. Jen malgranda mistero: Pip Williams verkis grandparton de la romano en kafejo proksime al la domoj de Bob Felby kaj de mi, sed ni ne konas ŝin.

Margaret Furness

## Brizbana Esperanto-Societo

BES ne povis kunveni en sia normala renkontejo ĉe la Brizbana Biblioteko de post marto. Espereble ni ricevos permeson kunveni je la 13a de februaro. Aliflanke ni eble kunvenos ĉe la Botanika Ĝardeno.



Antaŭ nelonge mi renkontis membrojn de la Kanbero Esperanto Grupo. Normale ili kunvenas ĉe "San Churro" en Woden, jaŭde. Estis tre refreŝiga babilo kun kelkaj junaj Esperantistoj.



Eminenta membro Huigh ankaŭ partoprenis kun scio kaj saĝo.

Petro Danzer

**3ZZZ** En la elsendo de la 1a de februaro oni ekscias kiel Anton Oberndorfer konsideras 2021 kiel jaron de espero, kiel dividi la homaron en du kategorioj : la viroj kaj la virinoj , ne respegulas la realon kaj kreas ne solveblajn problemojn . Ĝi enhavas ankaŭ anoncon pri la universala Kongreso en 2023.



Franciska Toubale

Mensogo dirita sufiĉe ofte, fariĝas la vero.

Vladimir Lenin (kaj aliaj)



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**